

Zhāng Jiǔ Líng,  
Hú kǒu wàng lú  
shān pù bù shuǐ

Zhāng Jiǔ Líng,  
La akvofalo

Zhāng Jiǔ Líng,  
La akvofalo

*tradukita de Xiong Linping*

*tradukita de Manfred Retzlaff*

Wàn zhàng hóng quán  
luò  
tiáo tiáo bàn zǐ fēn  
bēn liú xià zá shù  
sǎ luò chū chóng yún  
rì zhào hóng ní sì  
tiān qīng fēng yǔ wén  
líng shān duō xiù sè  
kōng shuǐ gòng yīn yūn

De alto de dek-mil futoj,  
kvazaŭ de la ĉielo  
la kaskado fluge ĵetas sin suben,  
kaj ĉirkaŭ ĝi prezentiĝas  
nimbo jen ruĝa jen purpura.  
Ĝi, ŝajnante esti ĉielarko sub la suno,  
rekte falas inter arboj kaj tra la ne-  
bulo;  
en la serena vetero aŭdeblas  
bruo de vento kaj pluvo.  
Kiel majestas la monto Lushan!  
La nebulo kaj la akvo harmonie  
kunfandiĝas en fean iluminacion.

Blinde sin ĵetas purpur'  
akvofala  
en la abismon tie ĉi.  
Kaj disigas la ruĝo kaj pala  
akvofumo eliĝas el ĝi.  
De l' altej' nebulvualo  
subeniĝas tie ĉi,  
ĝi ruliĝas tra la valo,  
de la arboj gutas ĝi.  
Glime sur la ŝaŭm' ŝvebanta  
estas arko el odor'  
kaj la akvo estas bruanta  
kvazaŭ tondro en la for'.  
El la verdo de l' arbaro  
rokoj supren levas sin.  
La prafort' de l' vivantaro  
bolas jen en la ravin'.

*Verkinto de tiu ĉi ĉina poemo estas Zhāng Jiǔ Líng.*

*Traduko de la ĉina poemo "Hú kǒu wàng lú shān pù bù shuǐ" de Zhāng Jiǔ Líng en Esperanton de Xiong Linping.*

*Traduko de la ĉina poemo "Hú kǒu wàng lú shān pù bù shuǐ" de Zhāng Jiǔ Líng en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (\*1938-11-04) en 2013-12.*

*Arg-987-1990 (2014-04-04 19:34:22)*

*Arg-987-1991 (2014-04-03 10:44:09)*

*Arg-987-1993 (2014-04-07 16:42:27)*

*Pri la poeto vidu la retejon*  
*<http://ja.wikipedia.org/wiki/eḗḗḗḗḗḗḗḗ>*  
*respektive* *[http://en.wikipedia.org/wiki/Zhang\\_Jiuling](http://en.wikipedia.org/wiki/Zhang_Jiuling)*.  
*La titolo signifas: "De Hukou mi rigardas la akvofalon de la monto Lushan".*